

Sonorilo

64-a jaro, n-ro 4,3

novembro-decembro 1972

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

DUMONATA REVUO/TWEEMAANDELIJKS TIJDSCHRIFT



Sonorilo

Oficiala organo de Belga Esperanto-Federacio, St. Bernardssesteenweg 1078,
2710 Hoboken.

Poŝtĉekkonto: 1634.34 de BEF, Oude Donkiaan 83,
B-2100 Deurne.

Prezidanto: D-ro Pol Denoël, Rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.

Redakcio: Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne.

Ĉefredaktoro: Fernand Roose

Redakcia sekretario: Paul Peeraerts

Krome kunlaboris al tiu ĉi revuo: Hector Boffejon (Svisujo),

Henri kaj Herman Boljau (Antverpeno), Eddy

Frederickx (Antverpeno).

FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Kapitalo: 142 005 BF aldonaj pagoj akceptataj pere de la pĉk 2914 29 de
Maertens G., Brugge 3.

Donacoj al la fondaĵo pere de oficiala akto (ekz. per notaria akto) estu
adresitaj al BELGA ESPERANTO-FEDERACIO, asocio leĝa, por la
fondaĵo. Antaŭdankon!

MET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREEDE KLEDING

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - CABARDINEN - LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

Turismo kaj Esperanto.

Nova asocio, Monda Turismo.

Mi ne estas tute certa ke ni esperantistoj ĝenerale konscias kian grandan revolucion por la homaro tutmonda akcepto de facila, neŭtrala lingvo internacia alportus. Kulture, science, ekonomie, komerce, porpaco ni apenaŭ povas trotaksi tion. Ne estas dubo ke por tiu ĉi celo ekzistas nur *unu* taŭga lingvo, nia Esperanto, facila, vere internacia, nuancrica, elprovita kaj evoluinta dum preskaŭ 100 jaroj. Kara leganto, pripensu la diritajn vortojn! Ĉu ne estas nia morala devo ĉiel informi pri Esperanto, propagandi ĝin, mem uzadi ĝin kaj utiligi ĝin. Sed ĉiu agado por venkigi nian ideon devas esti prudenta kaj laŭ la principaro de Frostavallen, kvankam ni laboras en diversaj medioj.

Unu medio, en kiu ni ĝis nun tro malmulte laboris, estas la turismo. Kaj tamen ĝi estas kampo, kiu bezonas internacian lingvon kaj kie ni je minimumo da kostoj kaj laboro povas atingi rezultojn. La turismo hodiaŭ estas potenco "industrio", ankoraŭ kreskanta. La teknika evoluo de la transportiloj kaj la ĝenerala altiĝo de la vivnivelo ebligas tion. Homoj hodiaŭ vojaĝas multe pli ol antaŭe. Ĉiuj ankaŭ havas libertempon, kiun multaj utiligas por vojaĝi al alia lando. Ni ĝojas pro tio, ĉar turismo tute kiel la Internacia Lingvo kontribuas al paco en la mondo.

Por utiligi Esperanton kaj propagandi ĝin en turismo estis fondita speciala turista organizaĵo esperantista dum la U.K. en Vieno. (Mi intence uzas tie ĉi la vorton "propagandi" kaj ne "informi".)

Ĉu nova organizaĵo? Ĉu ni ne havas sufiĉe da tiaj en la movado, kiu certe malsanas pro surpapera organizaĵa elefantiado? Mi bone komprenas kaj kun la plej granda hezito mi partoprenis la fondiĝon de tiu nova asocio en la movado. Sed ne timu: Tiu ĉi nova organizaĵo, kiu portas la fieran nomon *Monda Turismo*, nek intencas esti nur surpapera nek intencas malplenigi vian monujon sed nur helpi al vi dum vojaĝoj kaj fari ESPERANTON *konata en turismaj rondoj*.

Kiel laboros Monda Turismo?

a) Recenzoj de turistaj aranĝoj.

La turistaj entreprenoj, egale ĉu ŝtataj aŭ privataj, flugkompanioj, vojaĝaj agentejoj, hoteloj aŭ butikoj, estas tre sentemaj por publikaj laŭdoj aŭ plendoj (= kritiko). Monda Turismo (= M.T.) celas krei, kunordigi, kontroli kaj publikigi tian kritikon (= recenzon) pri turistaj aranĝoj. La publikigo povas unue okazi en la Esperanta gazetararo, ekz. sub la rubriko: "Monda Turismo informas". (Ni ja havas la bonegan gazeton de d-ro Unger, Turista Mondo, kiun ni kompreneble danke eluzos.) Esperantistoj poste povas publikigi tradukojn en la nacia gazetararo, kompreneble indikante Monda-n Turismo-n.

Monda Turismo povas ankaŭ skribi rekte al turistaj entreprenoj pri kritiko. Tiel la nova asocio povas fariĝi ia tre utila sindikato por turistoj egale ĉu esperantistoj aŭ ne.

b) Rekomendo de turistaj entreprenoj.

En butikoj en multaj landoj oni vidas afiŝetojn aŭ ŝildetojn kun rekomendo de tiu aŭ tiu turista organizaĵo. La teksto plej ofte estas en angla lingvo. (Diners Club, Anglo American Tourist Association, Language Service, por nomi kelkajn.) Mi ofte min demandis: Kial ni esperantistoj ne povus fari same? Ni ja estas internaciaj kaj ni ofte vojaĝas. Per tia malgranda rekomendafiŝeto en butikoj, hoteloj, restoracioj k.t.p. ni povus vidigi inter alie la vorton *Esperanto* kaj la *verdan stelon*. La afiŝetoj surhavas la tekston: *Rekomendata de Monda Turismo. ESPERANTO*. La tri lastaj vortoj estas en la emblemo de la asocio.

Se ni povos aperigi la afiŝeton de Monda Turismo en la plej bonaj entreprenoj turistaj ni faras bonan propagandon ankaŭ por nia lingvo, propagando kiu bone subtenos la ĝeneralan informadon pri Esperanto. Samtempe la aktiveco per la rekomendaj afiŝetoj kreas konon kaj respekton por nia asocio Monda Turismo. Tio estas grava por ke ni havu influon en turistaj medioj. Nur tiam ni efike povas helpi al niaj membroj kaj aliaj turistoj.

Sed ne temas pri nura propagando. Devos esti vera rekomendado de absolute rekomendindaj entreprenoj. Do la celo ne estas iu amasdistribuo, sed tre limige oni donu la afiŝetojn al la plej bonaj kaj plej rekomendindaj entreprenoj. Se oni troe disdonas la rekomendojn, la tuta afero perdas sian sencon kaj memmortas. Por efektiviĝi nian planon pri la rekomendoj ni devas havi kunlaboron kun bonaj esperantistoj, precipe en turistaj lokoj. Tio estus tasko por la Esperantaj kluboj kaj societoj, ĉar la loka propagando apartenas al ilia laboro.

c) Kofraj etiketoj.

Ni preparas ankaŭ kofrajn etiketojn por niaj membroj. Tiel ni kreas veran kaŭzon por la esperantistoj ankaŭ uzadi siajn kofrojn por konigi nian lingvon al ŝoforoj, fervojistoj, personaro de flugkompanioj, portistoj, doganistoj kaj al aliaj turistoj. La etiketo ankaŭ estas bona distingilo, kiam la kofro venas inter 50 aliaj. Ĉiu membro de la asocio ricevos kelkajn kofretikedojn. Kiaj ili estos? Ili konsistos el la emblemo de la Monda Turismo.

d) Aliaj labortaskoj, kiujn ni estonte povos plenumi, se ni havos sufiĉe da membroj, estas ekzemple:

Stimuli kaj apogi la eldonadon de turistaj broŝuroj, libroj, atlasoj, mapoj, terminaroj en Esperanto. Ni esperas ke ni iom post iom povas iniciati aŭ mem aranĝi vojaĝojn por esperantistoj. La italaj esperantistoj montris al ni la vojon, kiam ili dank'al lerta kaj sindona laboro de gesinjoroj Grattapaglia aranĝis la vere sukcesan krosadon sur Mediteraneo.

Tiu turista aranĝo estis bonega propagando inter ĉ. 1000 neesperantistaj pasaĝeroj, kiuj dum tuta semajno povis konstati kiel bonege Esperanto funkcias praktike.

Membreco, estraro k.t.p.

Monda Turismo akceptas individuajn membrojn. La membreco validas por tri jaroj kaj la membrokotizo estas 60 belgaj frankoj. Ni ankaŭ akceptas kolektivajn membrojn (t.e. Esperantaj grupoj, asocioj). Ĝis plue la kotizo por kolektivaj membroj estos la sama, t.e. 60 belgaj frankoj.

La kotizon vi povas sendi al la kasistino de MT, f-ino Maria Henquinez, 1171 St.-

Maartensdal, B-3000 Leuven, Belgio, poŝtĉekkonto 9532.76. Por la kotizo vi ricevos membrokarton, kofroetiketojn kaj prospektojn se ili estos eldonitaj. Ne pensu ke vi ricevos malmulte por la mono. Vi ankaŭ ricevos la kontentiĝon subteni Esperanton en tute nova maniero.

Ĝenerala sekretario de Monda Turismo estas s-ro Nikola Nikolov, PK 45, Sofia, Bulgarujo.

Erik Carlén
prezidanto

NIA KALENDARO . . .

EŬROPA KONGRESO DE ESPERANTO (kaj 55-a Belga kongreso)

Loko: Luksemburgo

Tempo: Pentekoston 1973 (de sabato la 9-a de jun. ĝis lundo la 11-a)

Kotizoj:

Kongresan(in)o:	225 fr.	Kotizoj pagendaj al BEF,
Edz(in)o:	125 fr.	2100 Deurne, pĉk. 1634.34.
Junul(in)o		
ĝis 25-j.:	100 fr.	

Ni speciale atentigas ke la kotizoj indikitaj en la antaŭa numero de "Sonorilo" kaj tiuj indikitaj sur la aligilo *ne estas korektaj*. Ekde 1973.01.01 validas *nur* la ĉi-supraj tarifoj.

Loĝado:

BEF peras por la loĝado. Mendilo por loĝado troviĝis en la antaŭa numero de "Sonorilo" (pliaj ekzempleroj haveblaj ĉe s-ro J. Verstraeten, St. Bernardsesteenweg 1078, 2710 Hoboken). Bonvolu ĝin sendi plejeble baldaŭ, sed nepre antaŭ la 1-a de februaro, al la menciita persono.

Provizora programo:

Vendredon la 8-an: vespere: oficiala akcepto
gazetara konferenco
interkona rendevuo sen programo

Sabaton la 9-an: antaŭtagmeze: BEF-kunveno, aliaj kunvenoj
posttagmeze: fakkunsidoj
vespere: balo

Dimanĉon la 10-an: antaŭtagmeze: ekumena diservo, solenaĵo
posttagmeze: komuna laborkunsido
kunveno de UEA-delegitoj
vespere: kultura vespero kun kontribuo de
ĉiuj landoj

Lundon la 11-an: antaŭtagmeze: ekskurso per aŭtobuso tra
Luksemburgo kaj ĉirkaŭaĵoj
tagmeze: bankedo kaj adiaŭo.

KAJ LA VENKO DE ESPERANTO ... POR KIAM?

La opinio de la leganto . . .

De ĉiuj flankoj sonas alarmsignaloj pro la stagnado de la Esperanto-movado. En si mem tio estas bona afero, ĉar ĝi signifas ke la esperantistoj fine vekigaĵas el sia letargio.

Spartinte la evoluon de Esperanto al matura kaj plenalvora lingvo, la esperantistoj naive kredis ke la mondo volonte akceptos ĝin kiel solvon de la ĉiutage pli akre sentata bezono de komuna mondlingvo. Ili atendis, esperis kaj revis... ĝis skuis ilin la kruda rifuzo de "la mondo", t.e. de la plej altaj politikaj instancoj, eĉ nur konsideri ilian solvon.

Ili ekkonsciis ke malamikaj fortoj malobligas la racian solvon de la mondlingva problemo kaj ke la matureco kaj taŭgeco de Esperanto ne sufiĉas por kontraŭbatali ilin.

Evidentiĝis ke la Esperanto-movado devas eliri el sia ebura turo kaj kun novaj metodoj turni sin al la neesperantista mondo.

Tuj, pensante kiel Prezidento Franz Jonas de Aŭstrio ke la esperantistoj "ne atendu tro multe kaj ne postulu tro multe de la oficialaj funkcioj, sed fidu pli la propran forton" (Esperanto, sep. 1970), ekagadis en la medioj de la praktika ĉiutaga vivo kiel komerco, trafiko, sporto, turismo ktp. klopodante tie efektiviĝi la uzadon de Esperanto.

Aliaj, kiel la junuloj de TEJO kaj la gvidantoj de la Belgaj Esperanto-organizaĵoj, faris timidajn provon "iri al la amaso" en la formo de modesta manifestacio.

Kaj la artikoloj, kiuj lastatempe pli kaj pli ofte aperas en la Esperanto-gazetaro pledantaj por "scienca argumentado pri la mondlingva problemo", estas nenio alia ol la reago-maniero de la intelektuloj en la Esperanto-movado kontraŭ ties stagnado.

Ĉiuj serĉas novajn vojojn, sed estas kvazaŭ palpado de blinduloj kaj la ĝustan vojon oni ne trovas. Aŭ ĉu oni konas la ĝustan vojon sed ne kuraĝas ĝin suriri?

Antaŭ du jaroj (Deklaracio de Tyresö) oni povis kredi ke TEJO estis preta iri en la ĝusta direkto, sed poste nenio plu okazis en tiu senco. Ĉu TEJO eble ne havas sufiĉan ageblon en la kadro de UEA?

Post trijara vana kampanjo de la aŭtoro de tiu artikolo por aktivista ekstermovada premgrupo, la Belgaj Esperanto-organizaĵoj

preferis fari mem modestan manifestacion antaŭ la domo de la Belga televido demandante la elsendadon de Esperanto-kurso, nature senrezulte.

En siaj "Dek tezoj" (Heroldo de Esperanto n-ro 10 (1509), 71.07.10) D-ro Werner Bormann diras ke "la naciaj registaroj decidis (2a tezo) kaj ke "ni estas premgrupo kontraŭ la decidorajtaj politikistoj" (9a tezo). Se anstataŭ la vorto "estas" en la 9a tezo troviĝus "estu", tiuj asertoj estus tute pravaj, almenaŭ se "ni" estus "la esperantistaro". Tamen laŭ la starpunkto de W.B. "ni" estas UEA kaj la Landaj Asocioj" Sed tio estas iluzio! se almenaŭ oni ne konsideras premgrupo organizaĵon kiu kun ĉapelo en la mano humile proponas kaj petas.

Oni ne miskomprenu min. Mi neniel volas minimumigi la intereson de UEA kaj de la L.A. Ili estas ege valoraj kaj alte taksindaj kiel organoj de kultura movado, sed ne kiel premgrupo.

Premgrupo estas organizaĵo kiu aktive, konstante, persiste, konteste kaj agrese denuncas la lingvajn imperiismon kaj diskriminacion, la erarajn starpunktojn, la indiferentecon, hipokritecon, perfidon ktp de la politikistoj, kaj kuraĝe batalas por oficialigo kaj deviga instruado de Esperanto kiel sola komuna mondlingvo.

UEA kaj la Landaj Asocioj ne povas ludi la rolon de vera premgrupo, unue ĉar ili estas tro malfortaj kaj due, kaj precipe, ĉar ili estas tro integriĝintaj en la kontestatan sistemon. Kaj tion scias D-ro W. Bormann tre bone kaj tial, dirante ke ni estas (li devus diri: estu) politika movado, speco de premgrupo kontraŭ la decidorajtaj politikistoj, li tuj minimumigis aldonas "kulturpolitika movado" kaj "ia normala, demokrata entrepreni ĉie permesata, ebla en Okcidento kaj Oriento". La mondlingva problemo estas ne nur kultura, sed antaŭ ĉio socia demando kaj tial ni estu ne nur kulturpolitika sed antaŭ ĉio socipolitika movado. Kaj se nia premgrupo kompreneble ne celu perfortan revolucion, esti ia "normala, demokrata entrepreni ĉie permesata" tamen neniel signifas: esti nekontestema, nebatalema, almozpetanta societo.

Kion ni bezonas, tio estas amasa aktivista kiel supre priskribita premgrupo aganta ekster la nuna Esperanto-movado kaj

sendepende de ĝi. Tio kreus la avantaĝon ke la "oficiala" Esperanto-movado, UEA, kvazaŭ la registaro de Esperantujo, povus eventuale distanciĝi de la "neoficiala" premgrupo en la kazo ke ties agitado malplaĉus al iu politika aŭ registara instanco.

Iuj pensas ke estas neeble starigi tian amasan premgrupon. Sed ilian dubon kaŭzas nur la fakto ke ili ne kredas je la amaso. Ĉu ni ne povis legi ke "la nova subskriba kampanjo de UEA baziĝas sur la ĝusta (?) ekkono, ke ne plu eblas instigi la politikistojn al paŝoj per amasa movado"?

(Interlingvistika Informa Servo n-ro 3/1971). Tiun aserton de D-ro Artur Bormann oni povas kompreni nur tiel, ke "amasa movado por instigi la politikistojn", t.e. "amasa premgrupo" ne plu eblas. Sed kiel oni povas aserti tion, se la Esperanto-movado neniam faris eĉ la plej malgrandan klopodon starigi tian amasan premgrupon? Estas vere ke multaj asocioj, partioj, eklezioj, sindikatoj ktp. suferas pro ĝenerala neemo fariĝi membro (la tezo de D-ro W. Bormann), sed tio koncernas nur la "establitajn" organizaĵojn. La nuntempa homo ne nur emas aliĝi al tiuj organizaĵoj, sed fakte kontestas ilin ĉar ili estas integriĝintaj en la "establitajn sistemon" de kiu li sentas sin trompita. La kontestadaj movadoj kontraŭe prosperas.

La situacio estas simila en la Esperanto-movado. La membroj estas ĝenerale, ja preskaŭ ekskluzive varbataj far la lokaj grupoj. Pere de la kursoj organizataj far la grupoj ĉiujare aliĝas certa nombro da novaj membroj, sed ĉiujare ankaŭ ekŝiĝas sama aŭ pli granda nombro da membroj, ĉar ili konstatas ke ili trafis en grupon kiu de la konataj anglaj, francaj, rusaj aŭ alilingvaj kluboj diferencas nur per tio ke Esperanto ne estas tuj praktike uzebla kaj ke la grupa agado neniel antaŭvidigas ĝian baldaŭan uzeblecon.

Aktivista premgrupo, kies konstanta batalo naskas kaj subtenas la perspektivon de la venko kaj per ĝi stimulas la batalpretecon de la membroj, certe ne konos la dizertadon de la senluziigitaj kaj neeviteble devos atingi bonajn rezultojn. Konkluo: Ni aplaŭdu al ĉiaj, ĉu individuaj ĉu grupaj, agadoj por Esperanto, sed antaŭ kaj super ĉio ni urĝe starigu aktivistan movadon, kiu koncentru ĉiujn siajn fortojn sur la venkovolan batalon kontraŭ la malamikoj de Esperanto kaj por la oficialigo kaj deviga instruado de nia lingvo.

Hector Boffejon

DISE EN LA MONDO

Esperantista Renkontiĝo ree dum la Foiro en Lejpcigo okazos la 10-an de marto 1973 en la klubo de la inteligentularo "Gottfried Leibnitz", Elstarstrasse 35, DDR-701 Leipzig, je la 19-a h.30. Se vi estos en Lejpcigo, vizitu la lokajn esperantistojn.

Okaze de la Esperanto-ekspozicio la 30-an de aŭgusto en Munkeno, ĉeestis ankaŭ la urbestro Heydenreich, anstataŭante la ĉef-urbestron. Li montris grandan intereson por Esperanto kaj prenis informmaterialon, i.a. ankaŭ lernolibron. Li diris, ke li havas multe da intereso por lingvoj kaj volas ankaŭ okupi sin pri Esperanto. (PP)

En la kadro de siaj kariljonaj koncertoj dum la arta olimpika programo, Jo Haazen el Antverpeno ludis la Esperanto-himnon antaŭ dekmiloj da aŭskultantoj.

En letero al s-ro William H. Schulze, direktoro de la Esperanto Information Center en Usono, diris Avery Brundage, prezidanto de la Olimpika Komitato, la jenon pri Esperanto: "Estas vere ke Universala Lingvo estus tre helpa en la Olimpika Movado. Bedaŭrinde tamen, Esperanto ne estas sufiĉe vaste uzata. La afero estis diskutata dum unu de niaj kunsidoj sed trovis malmulte da subteno. Eventuale estos eble kunlabori kun vi je pli posta tempo". (PP)

Ekfunkciis en Barcelono, Hispanujo, Hispana Esperanto-muzeo. Same kiel la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, ĝi estos sekura rifuĝejo por la trezoro de Esperantujo. Kiu deziras pliriĝi la Hispanan Esperanto-Muzeon povas sendi materialon al Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428, Barcelona, Hispanujo.

"Cine - Fiat" en Torino preparis novan Esperanto-filmon pri FIAT 127. Por informoj skribu al Fiat, Torino, Italujo.

Dum la 57-a U.K. de Esperanto en Portland, ni konstatis preskaŭ senprecedencan intereson de la registaro de Belgio. Tiu interesiĝo, almenaŭ la rimarkinda alflugo de la kanceliero de la konsulejo en Sanfrancisko, estis pli ol verŝajne okazigita de letera kampanjo de Belga Esperanto-Federacio al la ministroj kaj parlamentanoj.

ESPERANTO-BALO EN ANTVERPENO

La Esperanto-baloj iam estis grandaj okazaĵoj en Belgio. Bedaŭrinde tiu ĉi bela tradicio velkiĝis. Kun la celo revivigi tiun ĉi kutimon, la antverpena Esperanto-Grupo "La Verda Stelo" (kiu interkrampe ĵus bonvenigis sian 250-an membron!) organizis la 10-an de novembro grandan Esperanto-balon en la prestiĝa "Bouwcentrum" kie cetere ankaŭ la ĉi-jara belga kongreso okazis. Malgraŭ la malbonega veteraĉo 120 dancemuloj ariĝis. La atmosfero estis grandioza kaj bona instigo por la preparoj de la venonta dancfesti.

Sur la foto: La prezidanto de la Antverpena Grupo kun sia edzino dum la balo. (fotis: H. Boljau)



En densa afrika ĝangalo senmonaj nigruloj per ni ĵus solvis la lingvan problemon ĉar ĉe ni jam eksonis la kri':

Poŝtmandatojn arope sendas ja ni.

Nu, la afrikanoj, kaj cetere ankaŭ la azianoj, ne estas verdire senmonaj, pli precize ili estas senvalutaj aŭ alivorte netranspagopovaj. Ili ne povas aĉeti Esperanto-gramatikojn, ili ne povas aboni Esperanto-gazetojn, ili eĉ ne povas aĉeti kvinpintan stelon, ankaŭ ne la plej malgrandan.

Ĉe ĉi-tiuj kondiĉoj la pluevoluo de Esperanto en tiuj landoj dependas de ni.

Ĉu ni rifuzu gramatikojn al ekstereŭropaj petantoj?

Se ne, sendu jam hodiaŭ vian kontribuon al la

TUTMONDIGA FONDUSO DE TEJO

poŝtĉekkonto 1/20718 de Nino Vessella, Via Panniglia 54, I-03030 Roccasecca Scalo (FR), Italujo.

La mistera numero 2 . . .

Pro ĝis nun ankoraŭ nekompreneblaj kaŭzoj, la dua ĉi-jara numero de "Sonorilo" ricevis la numeron 3, kaj la tria numeron 4. Ni pardonpetas pro tiu ĉi erareto. La nuna numero kiun vi havas en viaj manoj estas la kvara (kaj lasta) ĉi-jara.

Novaj kotizoj por 1973

Tiuj kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon por 1973 bonvolu tion fari plejeble baldaŭ. Ni tamen devas atentigi vin ke la kotizoj de BEF, kiuj dum dek jaroj restis senŝanĝaj, nun iomete altiĝis pro la daŭre altiĝantaj administraj kostoj. La novaj kotizoj estas jenaj:

Simpla Membro (M): 200 fr., ricevas membrokarton, la revuon "Sonorilo", "Esperanto-Panoramo" aŭ "L'Esperanto en Marche".

Familia Membro (FM): 75 fr. povas esti tiu kiu loĝas en la sama adreso kiel Simpla Membro. Li/ŝi ricevas membrokarton sed ne revuojn.

Junula Membro (JM): 75 fr. povas esti ĉiu inter 16- kaj 25-jara. Ricevas ĉion kion Simpla Membro ricevas plus la revuon "Koncize".

Kadeta Membro (KM): 45 fr. povas esti ĉiu ĝis 16-jara. Ricevas membrokarton sed ne revuojn.

Bonfaranta Membro (BM): 300 fr. aŭ pli. Ricevas ĉion kion Simpla Membro ricevas.

Tiuj kiuj krome deziras esti individua membro de Universala Esperanto-Asocio, povas iĝi:

Membro kun Jarlibro (210 fr.)

Membro Abonanto (420 fr.) Ricevas Jarlibron (2 partojn), la revuon "Esperanto" kaj membrokarton.

Membro Subtenanto (625 fr.) Havas la samajn avantaĝojn kiel Membro Abonanto.

Patrona Membro (4200 fr.) Havas la samajn avantaĝojn kiel Membro Abonanto.

Dumviva Membro (8400 fr.) Pagas unu fojon nur kaj dum sia tuta vivo havas la avantaĝojn de Membro Abonanto.

Junula Membro kun Jarlibro (105 fr.) (ĝis 21-jara)

Junula Membro-Abonanto (315 fr.) (ĝis 21-jara) Ricevas ĉion kion Membro Abonanto ricevas, plus la revuon "Kontakto" de TEJO.

BIBLIOGRAFIIO



La libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo” (s-ro Iserentant R.), Kerklaan 61, BRUĜO, Poŝtĉekkonto 152140.

“Budhisma Katekismo”. Havebla ĉe s-ro M. Bury, Rue des Fagnes 19, B-4131 Les Awirs, Belgio. Broŝuro. 43 p., 50 b.fr.

Ni supozas, ke plej multaj jam konas iomete la personecon kiu estis Budho. Ni povas tamen legi ankoraŭ kelkajn notojn pri Li en tiu-ĉi broŝuro. Sed la ĉefa afero estas ke per tiu eldonaĵo ni ekkonas la instruon de Budho. Ĝi estas klara kaj kompleta klarigo pri la esenco de la Budhismo. Kiel tia ni varme rekomendas ĝin. Ni akcentu speciale ke ĝi pensigas nin pri unu de la plej gravaj problemoj de la vivo, problemoj kiu tiom konsternas la homaron; tiu de la sufero. Kiu estas ĝia signifo? Ĝia spirita profito? Kiel eviti ĝin, aŭ, pli bone, ĉar ĝi ne estas evitebla, kiel liberiĝi de ĝi? Per fera logiko estas montrata la vojo far Budho. Sed, envere, oni bezonas ankaŭ feran volpovon por sekvi tiun vojon! Sufiĉu jena skribaĵo; aĉetu kaj legu la broŝuron.

Henrik Seppik: “La tuta Esperanto”. Eldonis: Sofia Distrikta Urba Komitato de BEA. Liveras: Bulgara Esperantista Kooperativo, str. Neofit Rilski 18, Sofia, Bulgarujo. 180 p. Ofseta. Prezo ne indikita

Henrik Seppik, Estono kiu naskiĝis en 1905, estas jam konata en nia movado pro la multaj kursoj kiujn li, kiel Csehmetoda instruisto, gvidis en diversaj landoj. La jena lernolibro aperis unue en Sveda lingvo. Nun ĝi aperas, reverkite, en Esperanto mem. Pro tiu fakto ĝi estas destinita al tiuj kiuj jam konas la lingvon sufiĉe por kompreni facilan tekston. Tamen ankaŭ la komencaj nocioj en Esp. estas pritraktitaj. Tiel ĝi ebligas re-lernon. Samtempe ĝi ebligas ankaŭ perfektigon. Rilate al la problemoj -ita, -ata, la aŭtoro estas de la “-itista”, aŭ se vi preferas, de la “aspekta” skolo. Tion bone montras liaj klarigoj pri -ita: ..indikas ke la ago estas jam finita; kaj pri -ata: ..indikas ke la ago daŭras, ne estas ankoraŭ finita; (paĝoj 65 kaj 66). Nur unu rimarko ankoraŭ. Kvankam “kompleta”, ni devas diri ke la klarigoj pri la uzo de “-sia” ne sufiĉas por doni solvon al ĉiuj kazoj. Tiu (nelogika) punkto de la Esp.-gramatiko postulas ampleksan pritraktadon por tiuj kiuj volas efektive “perfektiĝi” en nia lingvo. Mi povas rekomendi la libron. Ĝi estas klara, kaj la akompanantaj tekstoj estas bone elektitaj.

Karel Čapek: “Libro de Apokrifoj”. El la ĉeĥa tradukis Josef Vondroušek. eldonis La Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Praha. 106 paĝoj.

Tiu tute propra-karakteraj aŭtoro kiu mortis en 1939, iĝis mondfama per sia teatraĵo “R.U.R.”, ankaŭ en Esperanto tradukita. Temis pri la de tekniko robotigita homo. Pri kio temas en la jena libro? Apokrifoj estas skribaĵoj el la antikva Hebrea popolo, kiuj de la kristanaj eklezioj, ne estas konsiderataj kiel sanktaj, de Dio inspiritaj. La diversaj kristanaj eklezioj malsamopinias en tio kiuj skribaĵoj estas apokrifaj kaj kiuj ne. La aŭtoro imagas rakontojn, okazintaĵojn de el la mitologia periodo ĝis la 19a jarcento, de famaj personoj, kiuj fakte ne okazis, sed kiuj estus povintaj okazi, tute konkorde al ilia naturo, strebado. Precipe la atmosfero de tiuj rakontoj aŭ figuroj estas bonege rekreataj. Tial ĝi estas absolute rimarkinda libro.

F.R.

Laste aperis

HO CHI MINH: ANEKDOTOJ DE VOJAĜO, aŭ: PREZIDENTO HO CHI MINH RAKONTAS... T. Lan. 95p. Ilus. 19cm, 21 fr. Rerakontitaj epizodoj el la vivo de la vjetnama gvidanto inter 1920 kaj 1945.

BIBLIA STUDPLANO — POR HELPO DUM LA KVIETA TEMPETO ANTAŬ DIO. Eld. Sveda Sekcio de KELLI. 2a eld. 1971. 16p. 14cm. 10 fr. Po unu teksto por ĉiu tago de la jaro.

BEOGRAD, JUGOSLAVIO Ilustrita faldfolio turisma. Petu de: Turista Oficejo de Beograd, Moše Pijade 1, Beograd, Senpaga.

BRAGA, ISMAEL GOMES (1971) Z. Wantuil. 41p. 18cm, 23 fr. Biografio de la konata brazila spiritisto kaj Esperanto-aktivulo (1891-1969).

DOKTORO KAJ LINGVO ESPERANTO Adolf Holzhaus, 524p. 21cm. Ilustrita. Ledimita bindo. 700 fr. Esploroj pri la vivo de Zamenhof kaj komenco de la Esperanto-movado en la rusa kaj juda medioj. Enestas ankaŭ biografio de la patro de Zamenhof.

DROLE KAJ PETOLE Giorgio Silfer. 18p. Ilus. 25cm. 42 fr. Originalaj anekdotoj.

DUA GVIDLIBRO DE EZOPOLOGIO ESPERANTA, LA Hukuta-Masao. 106p. 21cm. 60 fr. Ilus. Kompara studo pri la Esperanto-tekstoj de ezopaj fabeloj fare de Nakagaki-Koziro kaj K. Oŝsaka, kun japanlingva komentario.

ESPERANTA LEGOLIBRO Elio Migliorini. 255p. 17cm, 95 fr. Tre ŝatata legolibro, kun sekcioj ‘Tra la vivo’, ‘Tra la lingvo’ kaj ‘Tra la literaturo’. Kvina eldono, reviziita kaj pligrandigita.

FAULHABER RAKONTAS... (1972) 32p. 21cm. 27 fr. Konata nederlanda esperantisto, membro de la Akademia, rakontas ok gajajn historietojn.

INFANOJ DE LA MALRICULOJ (1933) John A. Lee (1891-). El la angla tradukis Bertram Potts (1972). 271p. 17cm. 138 fr. Konsciencuveka aŭtobiografia romano pri la vivo en Nov-Zelando dum la granda ekonomia krizo intermilita.

KATOLIKA TERMINARO NEDERLANDS-ESPERANTO (1972) H. Roosen kaj H.G. Wannemakers. 96p. 21cm. 42 fr. (serio de I.K.I., 19-20). Unudirekta, nederlanda-Esperanta.

ORGANIZAĴO DE UNUIGINTAJ NACIOJ, LA. (1972) Diversaj aŭtoroj. 27p. Ilus. 20cm. 38 fr. Originalaj studentaj referaĵoj de la Scienca Esperanto-Rondo en Wrocław, Pollando.

PRI SENTEMO POR ĈIES SITUACIO (1972) Charles F. Carter. El la angla tradukis Marjorie Boulton. 48p. 21cm, 54 fr. Unu el la prelegoj Swarthmore de la Societo de Amikoj (Kvakeroj).

SANKTA MESO, La Paroloj de la traduk-servo de Vatikano. Muziko de H. Benda. 31cm. Teksto kun muziknotoj. Voĉa partituro: 13 fr. Kompleta partituro: 26 fr. SANKTA MESO, La Paroloj de la traduk-servo de Vatikano. Muziko de H. Benda. Disko duflanka, 18cm, Monofona. 45 t/m. 108 fr. Registrita en Monako en 1969.

SPORTA LINGVO EN ESPERANTO, LA (1972) Tibor Ujlaky-Nagy. Eld. Hungara Esperanto-Asocio. 305 p. 20 cm. Projekta prezento de ĉiuj sportaj terminoj en Esperanto.

ŜERCOJ, RAKONTOJ KOMP. Vilmos Benczik, 104p. 16cm. 11 fr. Kun hungarlingvaj piednotoj kaj vortareto. Plejparte rakontoj, sed kun kelkaj aĥekdotoj, fabeloj kaj poemoj. Internacie uzebla.

TIEL PAROLIS LA BUDHO KAJ LIAJ DISCIPLOJ T.T. Anuruddha (komp.) Tr. el la lingvoj palia, sanskrita kaj angla. 98p. Mimeo. 18cm. 31 fr. Kolekto de budhismaj versaĵoj kaj sentencoj, eld. en Suda Vjetnamujo.

VOJAĜO AL NOVZELANDO, La (1972) S. Hori. 127p. 22cm. Ilus. Bd. 146 fr. Japana biologo rigardas Nov-Zelandon el vidpunktoj zoologia, botanika kaj sociologia. VOJAĜO AL LA SUDA INSULOJ, La (1971) S. Hori. 64p. Ilus. 19cm. 35 fr. Tajvano kaj la insularo Jajama tra la okuloj de japana profesoro pri biologio.

LA FOTOKOPIA SERVO DE UEA PROPONAS:

pretajn, kompletajn kaj tuj liverablajn fotokopiojn de la ĉi-sube listigitaj verkoj. Ĉiu kompleto en plasta bindaĵo.

BAHA'U'LLAH KAJ LA NOVA EPOKO (1930) J.E. Esslemont. El la angla tr. Lidja Zamenhof. 192p. 30,60 gld.

KAIN, MISTERO (1821) Lord Byron. El la angla tr. A. Kofman (1896). 102p. 18,90 gld. Versa dramo, praverko de la Esperanta literaturo. Eld. Tümmel, Nurnbergo.

L'ESPERANTO COMME LANGUE AUXILIAIRE INTERNATIONALE (1922) Ligo de Nacioj. 44p. 9,—gld. La franclingva eldono de la raporto de la ĝenerala sekretario, kiun akceptis la 3a asembleo de Ligo de Nacioj. Kun marginaj notoj de Petro Stojan.

STREĈITA KORDO (1931) K. Kalocsay (1891—) 189p. 31,50 gld. Originala poemaro, mejloŝtono en la Esperanta poezio.

KORESPONDI DEZIRAS ...

Geknaboj 13/14-jaraĝaj deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn. Skribu al ilia instruisto: S-ro L. Schödl, Rosa-Luxemburgstr. 37, DDR-195 Neuruppin, Germanujo.

EN LA ESPERANTA GAZETARO

Antaŭ nelonge aperis la 10-a numero de "La Monda Lingvo-Problemo", elstara revuo plurlingva pri politiko, juro, psikologio kaj ekonomio en rilato kun lingvaj problemoj. La deka numero enhavas franclingvan artikolon de André Albault pri la lingvoj uzataj en medicinaj fakrevuoj, germanlingvan de Manfred Mayrhofer pri la problemeco de planlingvoj, ruslingvan de Ermar Svadost pri "Filozofio kaj Sociologio de la Lingvo" kaj laste anglan de W.A. Verloren van Themaat pri la du signifoj de la vorto "idiomajo". Ampleksaj resumoj en Esperanto troviĝas post ĉiu artikolo. Krom tiuj ĉi konceptaĵoj ni renkontas en LMLP ankoraŭ tri recenzoj de libroj pri Esperanto kaj lingvaj problemoj. Tre konsilinda revuo. Ĉe UEA: 350 fr. jare.

La novembra numero de "Esperanto" de UEA estas grandparte dediĉita al literaturo en la kadro de la internacia libro-jaro. Ĝi enhavas 10 recenzoj de gravaj novaj verkoj. Pri mozaiko de kulturoj kaj lingvoj en Kanado, unu el la plej grandaj landoj de la nova mondo, traktas artikoloj de Rüdiger Eichholz kaj Brian Kaneen.

EL LA NACILINGVA GAZETARO

Laŭ "Gazet van Antwerpen" kaj "Le Soir", du poloj floris de Varsovio al Parizo sur la enlandaj kanaloj. Sur ilia floro troviĝis ŝildo kun la jena teksto en Esperanto: Pacon al niaj infanoj. "Le Monde et la Paix" (Bruselo) abunde sur tri paĝoj raportis pri la Kultura semajno en Budapeŝto.

En "De Standaard" aperis preskaŭ tutpaĝa polemiko pri Esperanto reage al humura artikoleto pri "fakvortaro" pri blasfemoj en la Internacia Lingvo. La tuto donis tre pozitivan aspekton. Unu el la konkludoj de la redaktoro estis: "El la multaj leteroj ni konstatas ke fakte neniu estas kontraŭ Esperanto. Ĉiuj estas aŭ por aŭ indiferentaj". Pliajn detalojn pri tio ĉi povis legi en la (nederlandlingva) revuo "Esperanto-Panorama".

La "Daily Express" (3,5 milionoj da ekz.) grande titolis la 11-an de oktobro: "By George, it could be the talk of Europe!" (Mia Dio, ĝi povus esti la lingvo de Eŭropo!). El la artikolo ni lernas ke Harold Wilson, vidante homon kun verda stelo en la butonruo, alparolis lin en Esperanto kaj ricevis respondon.

IOANNES GORUPIUS BECANUS, MEDICINISTO KAJ FILOLOGIA PIONIRO EN LA RONDO DE CHRIST. PLANTIN.

(Daŭrigo)

Plantin, mem nur dum 5 jaroj urbano de Antverpeno, tiam ankoraŭ ne estis presisto sed konata ledisto. Lun vesperon li alportis ledan kofreton al eminenta kliento de si, Gabrielo de Cayas, la sekretario de Filipo II-a. Hazarde tiam kelkaj ebriuloj serĉis iun malamikan citroludiston, kaj pensante ke Plantin kun sia kofreto estas tiu muzikisto, ili ege, eĉ morte vundis lin. Li estis flegata de la du tiam plej konataj Antverpenaj kuracistoj: Ioannes Farinalius kaj nia Goropius Becanus.

Por Plantin, kiu estis vundita je la ŝultro, ne plu eblis esti ledisto kaj li tial iĝis presisto. Post kelkaj jaroj li devis foriri al Parizo tial ke li estus presinta protestantan libron. En 1563 li povis reveni kaj tiam la presejo estis refondata kiel kompanio de kiu Plantin estis la kompaniestro kaj 4 aliaj la kompanianoj: Karolo van Bomberghe, Kornelio van Bomberghe, Jakobo de Schotti kaj Becanus. Becanus investis en 1563 300 pundojn kaj en 1566 ankoraŭ 600 flandrajn pundojn. Kune kun sia bofrato, la Antverpena komercisto Gaspard van Surck (Surcius), li estis la precipa pruntedonisto de Plantin.

Ĉiuj kompanianoj de la preseja societo estis parencoj: Karolo kaj Kornelio van Bomberghe estis kuzoj, Becanus edziĝis kun ilia prakuzino Katarina des Cordes, ŝia fratino edziniĝis kun Karolo van Bomberghe kaj Kornelio estis la edzo de la fratino de la alia kompaniano Jakobo de Schotti, Klementina de Schotti.

En 1567 Plantin ĉesigis la kompanion ĉar li timis esti denove suspektata de protestantismo. La kuzoj van Bomberghe fakte estis fanatikaj kalvinistoj.

Kiel mi diris Becanus edziĝis kun Katarina des Cordes. Estis vidvino de riĉa komercisto, Hieronymus Helman, kiu mortis en 1557 aŭ 1558, versaĵe dum la perstepidemo en Antverpeno. Ŝi havis unu fileton, Fernandon, kaj naskis ankoraŭ du filinojn de Becanus: Katarina (o1563) kaj Isabeau (o1565).

En Antverpeno Becanus estiĝis fama, estimata urbano, eĉ privata kuracisto de la Fuggerfamilio, la konataj bankistoj, pruntedonistoj de Karolo Va. Li ankoraŭ estis

profesoro en la urba medicina kolegio kaj poste urba kuracisto.

La 15an de januaro 1563 li sendis petleteron al la urbestro, en kiu li konstatis ke estus necese indiki mediciniston por kontroli la apotekistojn. Tiu medicinisto ankaŭ devus ĉiam klarigi ĉion kiam oni aĉetus fremdajn herbojn. Ankaŭ estus utile ke iu komencu urban herbaron en kiu troviĝus ĉiuj herboj precipe la terajko kaj la mitridato, kiujn oni povis aĉeti nur en Venecio.

Ankaŭ necesis ke iu skribu historion de Antverpeno por ke la urbo estu ankoraŭ pli mondfama.

Por ĉiuj tiuj funkcioj laŭ Becanus nur unu persono taŭgis: li mem.

En 1569 li transloĝiĝis al Lieĝo, eble ĉar li estis suspektata de protestantismo, certe por havi la eblecon labori en pli trankvila atmosfero ol en la malkvieta Antverpeno. Li loĝis en Lieĝo ĉe siaj amikegoj la princ-episkopo Gerard van Groesbeeck, ties vikario Laevinius Torrentius kaj la kanoniko de Sankta Lamberto Carolus Langhies (De Langhe).

Becanus estis podagrulo kaj en Lieĝo li ankoraŭ pli malsaniĝis. Somere 1573 la grafo Medina Coeli venigis lin kiel kuraciston al Maastricht en kiu urbo li ankoraŭ pli malsaniĝis kaj mortis. Li ankoraŭ povis demandi al Torrentius kaj Surcius, kiuj ambaŭ ĉestis, prizorgi sian edzinon kaj infanojn kaj publikigi siajn neeldonitajn verkojn.

Du el ili estis eldonitaj, ambaŭ dikaj volumoj de pli ol 1.000 paĝoj. Ili estis kaj estas iomete fifamaj tial ke nia aŭtoro provis prui en ili ke la unua lingvo de la homaro estas la nederlanda kaj tutspeciala ĝia antverpena dialekto. En 1569 Plantin eldonis la "Origines Antwerpianae", "La Origino de Antverpeno", skribita laŭ komisiono de la Antverpena urbestro sekve de la petletero kiun Becanus skribis.

En 1580 Torrentius publikigis, kiel li promesis al Becanus sur lia mortolito "Opera hactenus in lucem non edita" tio estas "La ankoraŭ neeldonitaj verkoj". Becanus ankaŭ intencis eldoni latinan tradukon de la greka "Poikile Istoria", la "Variaj historioj" de Claudius Aelianus. La kompleta manuskripto troviĝas en la reĝa biblioteko en Bruselo.

Tiuj ideoj de Becanus estigis kompreneble agitiĝon de la tradicia sciencularo kiu ĝis tiam ĉiam kredis ke la pralingvo estis la hebrea.

Kelkaj simpatii kun Goropius, ekzemple Torrentius, Kilianus, Sanderus, Boxhornius, Mylius kaj Scribani. La plej granda parto tamen reditis kiel ekzemple Lipsius, Scaliger, Vossius, Petrus Vulcanus, Leibniz, Ben Johnson kaj multaj aliaj.

Aliaj lingvistoj volis defendi liajn ideojn sed kun aliaj "pruvoj", ekz. Adrianus Schrieckius en la 16a jarcento kaj Isfridus Thys en la 19a. Por Becanus "Adamo" signifis 'haat-dam' t.e. digo kontraŭ la malamo (de la serpento), por Schrieckius 'aard-man' t.e. 'ter-viro' kaj por Thys 'adem' t.e. spiro.

En la eksterlando aliaj volis prui ke sia lingvo kaj ne la nederlanda estis la unua. Olaus Rudbeckius, profesoro en Upsala opiniis ke la sveda estis la unua lingvo de la homaro, aliaj diris la vaska aŭ hungara, la franco Paul Pezron preferis la keltan, la brito John Webb of Butleigh la ĉinan kaj la franca generalo Frey la anaman. La hispano Gonzalo Correas skribis ke en la Tera Paradizo Adamo parolis hispane, Eva itale kaj la serpento germane, la svedo André Kempe kontraŭe opiniis ke Dio parolis svede, Adamo dane kaj la serpento france...

Eĉ en nia jarcento troviĝas ekzemploj de lingva ŝovinismo: en 1934 turka lingvista kongreso konkludis ke sia lingvo troviĝas en la radiko de ĉiuj aliaj lingvoj, ĉar ĉiuj vortoj devenas de "günes", la turka vorto por 'suno', kiu estis la unua objekto kiu postulis nomon. La Novjorka Irlanda Eldona Kompanio eldonis libron, en kiu la aŭtoro 'pruvis' ke la Biblio estis skribita de Irlandanoj kaj ke la hebrea nur estas dialekto de la kelta.

Kial do Becanus estis ridinda en la 16a jarcento? Precipe tial ke la salto inter la Tera Paradizo kaj Antverpeno estas tro grandega. Li tamen klopodis klarigi tion, historie kaj etnologie, fidante al la Biblio kaj la popolmigradoj.

Ĉar, li diris, post la diluvo Noa' restis kun sia plej amata filo Jafet en Margiano kaj liaj aliaj familimembroj elmigris, poste konstruis la Babelan Turon kaj forgesis la unuan lingvon, kiun nur Jafet konservis. La plej aĝa filo de Jafet, Gomer, estis la prapatro de la Gommerii aŭ Cimberii aŭ Cimbri, pri kiuj Cesaro skribis ke ili estis la prapatroj de la Atuatukoj, belga tribo kiu, laŭ Becanus fondis Antverpenon. Jen la rilato inter la Tera Paradizo kaj Antverpeno.

Mi nun rakontas tion dum kelkaj minutoj,

sed Becanus provis prui ĝin en sia unua verko, "Origines Antwerpianae", tio estas en pli ol mil paĝoj.

Fakte, Becanus tute ne estis strangulo aŭ naivulo. Kiel unua en la historio li vidis la rilaton inter la diversaj hind-eŭropaj lingvoj sed kiel pioniro li erare rezonis. Anstataŭ konsideri la nederlandan, francan, italan, grekan k.t.p. kiel nepojn de unu prapatro, la hindeŭropa, li faris de unu el tiuj fratoj kaj kuzoj la prapatro. Proksimume la sama eraro kiel liaj samtempuloj, kiuj konsideris la hebrean — tute ne hindeŭropa lingvo — kiel la unuan.

Li vivis en epoko en kiu la naciaj lingvoj denove estis estimataj, epoko en kiu Dodonaeus (Dodoens), Simon Stevin kaj multaj aliaj verkis nederlande, epoko ankaŭ en kiu Boesbekanus (Boesbeke), kiu estis amiko de Becanus, malkovris en la Krimeo la krimegotan lingvon, kiu similis al la nederlanda.

Li ankaŭ estis granda scienculo: li estis bonega medicinisto, filozofo, matematikisto, kaj konis la latinan, grekan, hebrean, sirian, nederlandan, francan, germanan, anglan, italan kaj hispanan.

En sia epoko li jam ne plu kredis je gigantoj aŭ unukornuloj kvankam fama scienculo kiel Otto von Guericke en la 17a jarcento ankoraŭ kredis je ili.

Li ankaŭ en sia epoko jam opiniis ke, antaŭ Kristoforo Kolombo, la Normanoj estis en Ameriko.

Estas malfacilege doni ekzemplojn de liaj "pruvoj", ĉar fakte nur nederland-parolantoj povus kompreni ĉion. Tamen mi donos, kiel ekzemplojn, la signifon, laŭ Beke, de kelkaj propraj nomoj:

SPARTANOJ: = spaar-tand = ŝparu la dentojn: la spartanoj nek diris, nek manĝis multe.

EVA: = eeuw-vat = jarcenta ujo: la virino kiel eterna patrino. Tiu kiu plenumas tiun ujon (vat) estas la vat-er, t.e. la patro.

OSIRIS (Egipta dio): = ons Heer (is), t.e. nia Sinjoro (estas).

Oni povus serĉi multe da argumentoj por defendi lin. Tamen li mem donis en letero al Gerard van Groesbeeck la plej bonan argumenton. Li skribis tie: "Quis est enim qui non amet patrium sermonem?", tio signifas: "Kiu estas, kiu ne amas sian gepatran lingvon?"

Drs. Eddy Frederickx

El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro 80 FR.
2 jaroj 120 FR.
3 jaroj 160 FR.

ABONU: Ĉe

Eldonejo — Librejo "SONORILO"
Kerklaan 61
8000 BRUGGE
Pck.: 1521.40

Ĉiu abonanto por la jaro 1973, kiu faros
abonon antaŭ la 31-a de la venonta januaro,
ricevos belan esperantan bild-kalendaron.



Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

J. VERDYCK & Co Pvb.

ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo

Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

Telefono 272875